


# LA JUNIA VIVO



## MONATA ORGANO DE „TUTMONDA JUNULAR-ORGANIZO”

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: TJO-CENTRO, WEST-GRAFTDIJK, NEDERLANDO.  
 ĜIRONUMERO 382363. • JARABONO 1,50 NED. GULDENO AŬ EGALVALORO.

### ADMONO.

Iam Zamenhof ricevis leteron subskribitan „Unu el la plej varmaj amikoj de la lingvo „Esperanto”. Li respondis: „Mi efektive memoras, ke de tempo al tempo vi sendas al mi leterojn kun demandoj pri la irado de la afero; sed neniam ankoraŭ vi skribis al mi kion vi mem faris por nia afero. Varma amiko de nia afero povas sin nomi ne tiu, kiu ĉiam demandas, sed nur tiu, kiu laboras por nia afero kaj vastigas ĝin. Anstataŭ demandi min ĉiumonate: „Kio estas farita?” vi devas en la fino de ĉiu monato demandi vin mem: „Kion mi faris por nia afero en la pasinta monato?”

TJO-anoj, la supra admono rilatas ankaŭ vin! Ankoraŭ ne venis la tempo por ripozo! Laborantojn ni bezonas, konstruantojn, kiuj konstruos fortan junularmovadon! Ne sufiĉas, ke vi mem estas ano, varbu ankaŭ viajn korespondantojn! Nur aktiva agado plene kontentigos vin! La estonteco apartenas al la junularo. Montru, ke vi serioze intencas fari ĝin kiom eble plej bona! Esperanto estas potenca armilo. Uzu ĝin dece!

Vi deziras afablecon? Estu afabla.

Vi deziras veron? Estu vera.

Kion vi donas de vi mem, vi trovos.

Via mondo estas reflektado de vi.

R. L. V.

## TJO-Somerkunveno en Soesterberg

(7-14 aŭgusto 1946).

La kunveno okazos en „Kampoord”, tendaro de la ANJV, ĉe la „Amersfoortschestraatweg” 124. Komenciĝo je la 7-a de aŭgusto, posttagmeze je la 3-a horo.

*Vojaĝo:* Trajne oni iru ĝis Amersfoort. De tie oni per tramo iru en la direkto Zeist. La haltejo por Kampoord kuŝas proksimume 50 m. de la tendaro.

*Bezonaĵoj:* litkovrilo(j)n, kaj dormsakon (aŭ 2 litotukojn plus kusenkovrilon); manĝilaron (forkon, kuleron, teleron, tranĉilon, pokalon); tualetilojn; manĝaj-kuponojn por unu semajno; muzikilojn kaj kantarojn; sport- kaj ludbezonaĵojn (pilkojn, ktp); flagojn kaj insignojn; bonan humoron kaj — se eble: belan veteron! — Surmetu praktikajn kampvestaĵojn!

*Oni anoncu sin ĉe:* Mary Kryt, Veefeeltstr. 156, A'dam.

*La kostoj* por la tuta semajno sumiĝos f 17,50. 9 Guldenojn oni samtempe kun la anoncado sendu al TJO-Centro (nepre per poŝtmandato). La ceteran monon oni pagu ĉe la alveno en Kampoord, kune kun la transdono de la kuponoj.

*La ĝeneralan gvidadon* de la tendaro prizorgos André Wend, Laing's Neckstr. 33<sup>1</sup>, Amsterdam-O. Bonvolu al li sciigi, kion vi kontribuos por la programo! Ĉar kompreneble ĉiu partoprenonto faros sian eblon pleniĝi belan programon, per kantado, muzikado, deklamado, teatrado, dancado, ktp.!

Ĉiu partoprenonto estas petata bone atenti la regularon de Kampoord!

Nur junulaj malpli aĝaj ol 30-jaraj rajtas partopreni. Gvidantoj povas esti pli aĝaj.

### Lastaj sciigoj pri la Blankenberga kunveno.

Eksterlandanoj alvenu la 1-an de aŭgusto. Oni unue prezentu sin en la akceptejo: Rijksnormaalschool, Jeugdherberg, De Smet de Nayerlaan 117, Blankenberge (200 m. de la stacidomo).

Disiĝo je la 5-a de aŭgusto.

Oni petu aliĝilon de Carlos Braet, Esseboomstr. 1, Brugge, Hollandanoj petu ĝin de Floor Meydam, Owenstr. 59, Leerdam. La plenigitajn formularojn oni sendu rekte al Carlos Braet.

### Kelkaj punktoj el la programo.

**Jaŭdon**, la 1-an de aŭgusto: Vespere Joĉjo Verstrael (Hollandano) parolos pri „La utilo de korespondado”.

**Vendredon**, la 2-an de aŭgusto: Posttagmeza kunveno: Philippe Cullus (Belgo) parolos pri „Ĉu la junular-Organizoj esperantistaj kaj neesperantistaj povas influi unu la alian?”

Vespere: Parolado de Carlos Braet. La filmo pri Tervuren.

**Sabaton**: Antaŭtagmeze: Laborkunsido de la belga sekcio de TJO.

Posttagmeze: Al la marbordo.

Vespere: La filmo pri Groet. — Parolado de S-ro Roose (Belgo). Karl Erik Karlsson (Svedo) parolos pri Svedujo.

**Dimanĉon**: Antaŭtagmeze: Laborkunsido de TJO (estraro).

Posttagmeze: Ekskurso al Brugge, la „Venecio de l'Nordo”.

Boatveturado sur la bruĝaj kanaletoj. Pririgardo de la urbo sub gvidado de S-ro Roose.

Vespere: Festvespero. La belgaj junulargrupoj prezentos kantaĉon kaj muzikadon.

Ne eblas jam doni la tutan programon. Ĉiu partoprenonto ricevos ĝin presita ĉe sia alveno en Blankenberge.

La oficialaj kantoj estos: „la Espero” kaj la „Kanto de la junular” (vidu la antaŭan numeron). Kiu havas muzikilon, kunportu ĝin!

### **3-a listo da partoprenontoj:**

Anglinoj: 23. S-ino W. M. Rixham, 13 Rokeby Terrace, Heaton, Newcastle on Tyne 6.

Belgoj: 24. Frans Wartens (17-j), Veldstr. 58 A. St. Kruis; 25. Marc Braet, Willem de Roolaen 10, Nieuwpoort (20-j); 26. Jacques Couwenberg, Koninginnelaan 18, Blankenberge (11-j).

Cehoj: 27. Jan Lamacka, Kukuĉinova 1524, Trenĉin (27-j).

Francoj: 28. F-ino Armande Camo, 6 rue E. Michel, Montpellier.

Nederlandanoj: 29. Petro Rulofido, Schoolstr. 43, Diemen; 30. Jan Leguit (20-j), Krommeniedijk; 31. Huib Oortwijn (23-j), Krommeniedijk; 32. C. Rens (25-j), Burgerbrug; 33. Arjen Pietjou (22-j), Leeuwarden; 34. M. Hartman, Wormerveer.

Nederlandaninoj: 35. F-ino E. M. F. Spits, Blerick; 36. Mary Krijt, A'dam.

Nepre ne forgesu kunporti kuleron kaj teleron, ĉar oni kelkfoje povos manĝi supon.

### **Stepa Domo invitas vin.**

„Konstruu gastejojn, kaj tien invitu la tutmondan junularon” diris Schirrmann, malfermante la unuan junulargastejon. La renkontiĝoj inter gejunuloj el diversaj landoj postulas facilan lingvon, ĉar la junulgastejoj ne estas konstruitaj nur por tiuj, kiuj povas

lerni plurajn fremdajn lingvojn. Tion komprenis antaŭ la milito „joganoj” el diversaj landoj: ili lernis Esperanton. Kiom malfacilaj estis la interrilatoj dum la lastaj jaroj. Sed ne prokrastu starigi ilin denove! De la 11a ĝis la 18a de aŭgusto 1946a okazos esperantista semajno ĉe Stepa Domo en Saint-Jean de la Neuville apud Bolbec (Seine Inf) Francujo. Vi estos tutkore akceptata. Petu informojn de Abd. Louvel, La Jolie, Bolbec (S.I), Francujo.

Paul Mary, O. C. A. D. O. de Ravensburg.

#### **Alvoko al la Junulgastejanoj.**

La junulgastejanoj el ĉiuj landoj, kiuj deziras krei internacian esperantogadon en la Junulgastejoj sin turnu al s-ro A. Albault, 49 rue du Cal. Battesti, Reims, Francujo.

Gazetoj estas petataj represii!

#### **Gejunuloj en ĉiuj landoj: konigu vian landon!**

La monata belga gazeto „Auberges”, sendependa organo de la Junulgastejanoj, deziras kontaktiĝi kun gejunuloj en la tuta mondo. Celo estas, ke tiuj gejunuloj regule, aŭ de temp’ al tempo verku artikolojn por „Auberges”, pri ĉiaj temoj (pri la junularaj organizoj en sia lando, vivkondiĉoj, libertempoj, laborkondiĉoj, lernejoj, popolkantoj, kutimoj, vestaĵoj, ktp.) La artikoloj nur ne propagandu politikon.

En „Auberges” jam de kelka tempo estas sufiĉe granda Esperanto-rubriko. Geamikoj, zorgu, ke tiu rubriko restu, ke ĝi estu bona propagandilo por nia movado Sendu verkaĵojn al: Léopold Hoger, 84 Chaussée de Gand, Bruxelles, Belgujo.

#### **Tutlanda propaganda kongreso.**

La „Nederlanda Centra Komitato Esperantista” (NCKE) decidis organizi tutlandan propagandan kongreson en Utrecht sabaton, la 7-an de septembro. Ĝi okazos en „Het N.V. Huis”, Poelhekkestr. 3, posttagmeze de la 2-a ĝis la 5-a horo. Kvar reprezentantoj de l’ 4 ĉefaj tendencoj en la Ned. Esp. Movado parolos. Ĉar la salono povas enhavi nur iom pli ol 1000 personojn verŝajne necesos porciumi la enirbiletojn.

#### **La solvo de la enigmo en No. 101.**

La limako bezonas 9 tagojn kaj dek noktojn. La dekan tagon ĝi estas sur la pinto do ne plu glitas malsupren.

La premion gajnis A. Blaauw en Heerhugowaard, Nederlando.

#### **ATENTU!**

Ĉi tiu numero estas duobla, do por julio kaj aŭgusto.

Pro ferio la TJO-CENTRO estos ferma de 1-19 aŭgusto.

KIAJ ESTAS LA BESTOJ?



Gracia sidas sur la brako de Luiza; ili rigardas al la kolombo sur la fig-arbo. Inter la folioj aperas Mimi mal-antaŭ la birdo. „For Mimi! iru for!” krias la knabinoj. La kolombo flugas al la kolombejo de la najbaro kaj Mimi malaperas al la hundejo. „Kia estas la kolombo?” demandas Luiza.

„La kolombo estas kara,” respondas Gracia.

„Kia estas Mimi?” „Mimi estas malbona: ĝi estas *fi-besto!*”

Mimi kaj Jipi kuŝas en la hundejo; ili ne batalas: ili estas *bonaj* amikoj.

Luiza kaj Gracia iras al la stalo. En angulo kuŝas pajlo: ĝi estas la dormejo de Blekemul kaj de Lizi, la kaprino. Nun Lizi ne estas en la stalo: ĝi estas sur herbejo. Rrrr! Kio estas tio? La bruo venas el la pajlo. Granda rato kuras al la alia flanko de la stalo kaj malaperas en truo malantaŭ la petrolujo. Brrr! La knabinoj kuras el la stalo. Ili estas palaj! „Rato estas *fi-besto!*” diras Luiza. „Ĝi estas danĝera: Ĝi atakas kaj mordas.”

La fratinoj iras al la kuniklejo. Malantaŭ la stangoj sidas sep brunaj kaj grizaj kunikloj. Ili manĝas de la herbo

inter la stangoj.

„Kiaj estas la kunikloj?” demandas Luiza.

„La kunikloj estas karaj,” diras Gracia. De la kuniklejo la knabinoj iras al la kuirejo. Ili revenas kun plado. En ĝi estas maizo por la kokinoj.

---

ĝi atak-as	fi-best-o	la kolomb- <i>ej-o</i>	la pajl-o
ili batal-as	la flank-o	kolomb-o	la plad-o
la bird-o	ĝi flug-as	ili kri-as	rat-o
la brak-o	for	maiz-o	ili rigard-as
la bru-o	la herb- <i>ej-o</i>	ĝi mal- <i>aper-as</i>	la stang-o
danĝer-a	inter	ĝi mord-as	
ŝi dir-as	kar-a	pal-a	

---

Ekzerco. Enmetu o-a; oj-aj: La frukt-*arb.* en ni.. ĝarden.. estas bel... Anita kaj ŝi.. amikin.. Maria ludas en la ĝarden.. de ni..


najbar... En ni.. kuniklej.. sidas sep nigr.. kunikl... La sun.. estas varm... Ĉu Mimi estas griz.. kat..? Ki.. estas ni.. brun.. hund.. Jipi? La kokin.. en la kokej.. kuras al la knabin... Ni.. insul.. Gran Kanario estas rond... La famili.. Novana loĝas en blank.. dom.. apud la vilaĝ... Kie estas Patrin..?

Ekzerco. Enmetu as aŭ u: Mi ir.. al la urbo. Ne ir.. al la kino, Felipo! Ir.. al la stalo! Mi naĝ.. en la maro. Ne naĝ.. Pablo! Rest.. en la ĝardeno! Ni lud.. sur la stratoj. Infanoj! ir.. al la domo; la nokto ven... Gracia plor... Ne plor.. Gracia! jen ven.. Luiza. Mimi sid.. sur la arbo. Ir.. for Mimi; ir.. al la hundejo!

Gramatika enhavo: la prefikso: fi; la prepozicio: inter; ripetado: o-oj; a-aj; kia(j).

## Leciono 14.

### LUIZA INSTRUAS, GRACIA LERNAS.



En la kokejo loĝas la koko kaj la dek kokinoj. Ili jam vidas, ke la knabinoj venas; ili klukas: tok-tok, tok-tok kaj kuras al la krado. Post kelkaj momentoj ili manĝas el la plado. Sed la kokinoj ne estas karaj; ili bekas kaj batalas.

„Kiaj estas la kokinoj?” demandas Luiza. „Ili estas malbonaj,” diras Gracia. „Ili estas fi-bestoj: ili batalas.”

En la mezo de la kokejo staras la koko. Ĝi ne manĝas, ĝi ne batalas; ĝi estas fieraj kaj rigardas al la kokinoj.

Luiza iras al la dormejo de la kokejo. En la pajlo kuŝas tri blankaj ovoj. „Kiaj estas la kokinoj?” ripetadas Luiza. „Ĉu ili estas malbonaj?” Gracia ne respondas. Ovoj estas bonaj.

„Kokinoj estas utilaj bestoj,” diras Luiza. „Sed ili ne estas karaj. Kia estas Jipi, Gracia?” „Ho! Jipi estas kara.”

„Kaj kia estas Gracia?”

La malgranda knabino ne respondas.

„Gracia estas ĉarma. Jen! kiso por ŝi!”

ili beka-s ĉarm-a fier-a	ŝi instru-as jam kis-o	ili kluk-as ŝi lern-as naŭ	ŝi ripet-as util-a ili vid-as
1 unu	11 dek	21 dudek unu	55 kvindek kvin
2 du	12 dek du	22 dudek du	60 sesdek
3 tri	13 dek tri	29 dudek naŭ	64 sesdek kvar
4 kvar	14 dek kvar	30 tridek	70 sepdek
5 kvin	15 dek kvin	31 tridek unu	73 sepdek tri
6 ses	16 dek ses	37 tridek sep	80 okdek
7 sep	17 dek sep	40 kvardek	88 okdek ok
8 ok	18 dek ok	46 kvardek ses	90 naŭdek
9 naŭ	19 dek naŭ	48 kvardek ok	99 naŭdek naŭ
10 dek	20 dudek	50 kvindek	100 cent

Ekzerco. Metu en la demandan formon: La muroj de la malbela domo estas altaj. La knaboj staras malantaŭ la fenestroj. La floroj en nia ĝardeno estas belaj. La blankaj papilioj flugas super la bluj violoj. Du maldikaj katoj sidas sur la ruĝa tegmento.

Ekzerco: Metu la frazojn en la negativan formon.

Ekzerco: Traduku kaj reesperantigu jenajn vortojn: ventumilo; vinagrujo; najbarino; ĵaŭdo; daŭrigo; kuirejo; subtegmento; mal-kontenta; gesinjoroj; tirkesto; salujo; necesejo; akvujo; kaprino; teretaĝo; daktilpalmo; malrapida; papilio; kuniklejo; tranĉilo; sinjorino; loĝejo; oleujo; genajbaroj; filino.

Gramatika enhavo: la nombroj 1-100; ripetado: fi-ĉu-ne-kia(j).

### Por komencantoj.

#### Bona respondo.

Oni ekzamenis junan mariston.

„Imagu, ke vi estas kapitano sur ŝipo. Via ŝipo veturas en rifo-plena maro. Subite vi ricevas radiogramon, kiu anoncas ŝtormon el la sud-okcidento. Kion vi farus?”

„Mi ankrigus la ŝipon.”

„Kaj se nova radiogramo anoncus ventegon ankaŭ el la nordo?”

„Mi elĵetus alian ankron.”

„Kaj se oni poste anoncus ankoraŭ uraganon el la oriento?”

„Mi denove elĵetus alian ankron.”

„Sed viro, de kie vi prenis tiom da ankroj?”

„Kaj de kie vi prenis tiom da vento, sinjoro?”

Subtenu la Tutmondan Junular-Organizon.

Mendu viajn esperantaĵojn ĉe la TJO-CENTRO.

### Kompato.

„Kial vi diris al tiu sinjoro, ke la distanco al la stacidomo estas nur kvin minutoj? Vi ja bone scias, ke li bezonos almenaŭ duonan horon!”

Jes, mi scias tion. Sed la sinjoro estis tiom afabla kaj ĉarma, kaj li aspektis tiom lace, ke mi kompatis lin.”

### La filozofo.

Kiam Petro estis infano, li jam estis tre maldiligenta. Kiam li fariĝis pli aĝa, li ne volis labori, kaj fine li fariĝis almuzulo. Dum longa tempo tio iris bone. Sed oni ja ne rajtas almuzpeti, do fine oni arestis lin. Li devis aperi en la juĝejo. La juĝisto demandis al li: „Ĉu vi povas diri ion por defendi vin?”

Petro demandis: „Kial almuz-peto estas krimo, se almuzdono estas bonfaro?”

*Respondu al jenaj demandoj:* Ĉu Petro estis diligenta? Kia li esti, kiam li estis infano? Ĉu li multe laboris? Kial li ne laboris? Kion li faris poste? Ĉu oni rajtas almuzpeti? Kio okazis? Kie Petro devis aperi? Kion diris la juĝisto? Ĉu Petro povis defendi sin? Kion li demandis?

Friĉjo: „Paĉjo, kial la cikonio ĉiam staras sur unu piedo?”

Paĉjo: „Tjes! Mi timas, ke ĝi falus se ĝi retirus ankaŭ sian alian piedon.”

el „Espero Katolika”.

### Ruza ekpenso.

Dum festo multaj gastoj sidis ĉe longa tablo. Unu el ili tre ŝatis fiŝon. Antaŭ li staris plado kun malgrandaj fiŝoj. Sed pli malproksime sur la tablo staris plado kun grandaj fiŝoj. Li tre deziris havi grandan ekzempleron. Sed kiel akiri tian? Ja ne decas, peti grandan fiŝon. Subite li ekhavis planon. Per sia forko li prenis fiŝeton de la plado antaŭ si. Li tenis ĝin ĉe sia dekstra orelo. Poste ĉe la maldekstra. Kaj li faris, kvazaŭ li atente aŭskultas. Liaj amikoj rigardis lin, kaj fine demandis, kion li faras.

„Ho,” li diris serioze, „Antaŭ du jaroj mia plej bona amiko dronis, kaj nun mi demandas al la fiŝeto, ĉu ĝi ion scias pri mia amiko”.

„Kaj kion ĝi diras?”

„Ĝi diras, ke ĝi ankoraŭ ne vivis, kiam okazis la akcidento. Sed la grandaj fiŝoj, kiuj kuŝas sur tiu plado, certe povos informi min!”



Ĉiuj ekridis, kaj oni transdonis al li la pladon kun la grandaj fiŝoj.

*Respondu al jenaj demandoj:* Kial ĉeestis tiom da gastoj? Kie ili sidis? Kio estis sur la tablo? Ĉu oni ŝatis fiŝon? Ĉu ĉiuj fiŝoj estis same grandaj? Ĉu estas ĝentile peti grandan fiŝon? Kiel unu el la gastoj tamen akiris grandan ekzempleron? Ĉu li estis ruza? Ĉu liaj amikoj komprenis lin?

### Joĉjo Akuratulo.

Servisto: „Mi kalkulis tiujn nombrojn dekfoje, sinjoro.”

Ĉefo: „Bonege!”

Servisto: „Jen estas la dek rezultatoj”.

### La sciencisto.

*Korektita ekzerco el la antaŭa No.* La filozofo Newton pripensis malfacilan problemon. Pro tio li forgesis matenmanĝi. Lia edzino sendis al li serviston kun ovo kaj akvujo. Li devis kuiri la ovon por la sciencisto. Sed s-ro Newton deziris esti sola kaj forsendis la serviston. Li diris, ke li mem kuiros la ovon. La servisto ankoraŭ atentigis sian mastron, ke la ovo dum tri minutoj devas kuŝi en la bolanta akvo. Li metis horloĝon ĉe la akvujo kaj foriris. Sed post iom da tempo li ree iris al la laborĉambro de s-ro Newton, ĉar li timis, ke tiu forgesos kuiri la ovon. Kiam li envenis li vole ne vole devis ridi: Ĉe la forno staris Newton. Li ege pensis pri io. En la dekstra mano li tenis ovon. La akvo bolis en la ujo kaj en ĝi kuŝis la horloĝo.

### KORESPONDADRESOJ.

**Britujo:** Du anglaj knaboj kun instruisto (esp-istoj) intencas bicikli ĉirkaŭ Belgujo post la Blankenberga kunveno kaj volas renkonti esp-istojn. Skribu al: F. W. Armitage, Windyridge, Winscombe, Somerset.

Dennis Hill (knabo) dez. kor. kun amikinoj en ĉiuj landoj. Respondo garantiata, 53, Lymington Rd., Dagenham, Essex.

**Ĉeĥoslovakujo:** S-ro Gabriĉl Adamica, Horny Val 7, Zilina, dez. kor. pri ligno-komercio, agrikultaro kaj agrinomio.

**Francujo:** Mi volonte korespondus kun sinjorinoj. M. D. L. Schwebel, Caserne Drouot, 1/15 RAD Iere. Batt., Aisne, La Fère.

**Nederlando:** Alie Broekhuis (20-j) dez. korespondi kun geamikoj en la tuta mondo. Adr: West-Graaftdijk, No. 13 (NH).

Nia infanklubo (10-14-j. infanoj) intencas organizi letervesperon je la 1-a de septembro. Ni petas la esperantistojn en ĉiuj landoj sendi al ni leterojn kaj poŝtkartojn. Ĉiu ricevos respondon kaj raporton pri ĉi tiu vespero. Skribu al: Jopie Bokhove, Sloetsweg 232, Hengelo (O).

Rika Leegwater (20-j. fraŭlino) dez. kor. kun ĉiuj landoj. Adr: West-Graaftdijk No. 103 (NH).

18-jara knabino (komencantino) dez. kor. kun geamikoj en la tuta mondo. Dick Broekhuis, p/a de Koekkoek, Oost-Graaftdijk (NH).

**Portugalujo:** S-ro José Rosa Caetano, P. Candido Reis (harbeoria), Beja, dez. kor. pri psikologiaj kaj ekonomiaj problemoj.

## TUTMONDA JUNULAR ORGANIZO.

### Raportaro pri la organiza jaro 1945/1946a.

Kiam TJO en Majo 1945a ree oficiale povis komenci sian laboron, ĝi devis fari tion sub tre malfavoraj cirkonstancoj. Poŝtaj rilatoj internaciaj apenaŭ ekzistis; ia superrigardo pri la stato de la organizo tute mankis. La tasko de la estraro estis malfacila; en la konscio, ke 5 krudaj jaroj fremdigis la diverslandajn gemikojn unu de la alia, fremdigis ankaŭ la estraron de la diverslandaj funkciuloj, ĝi sub ankoraŭ premaj cirkonstancoj personaj devis religi la rompitaĵajn fadenojn de la organiza reto.

Ĝi devis trovi novajn vojojn, krei novajn kondiĉojn, adaptitajn al la nova postmilita situacio kaj ĉi-tio en monatoj, kiam persona kontakto inter la estraranoj estis malebla kaj skriba rilato ege temporaba.

Sed tamen kun fido ni komencis „la vojaĝon en mallumo”. La rapideco, kun kiu la organizo releviĝis, superis ĉiujn bonesperojn. Malnovaj amikoj eklaboris, novaj sin anoncis kaj oferis kunlaboron.

Ne estas TJO-kutimo, pensi en ciferoj, datoj kaj sekaj faktoj, sed se mi diras, ke TJO nun laŭ nombro estas same granda, laŭ kvalito pli forta ol en 1939, tio entenas ĉion kion ni povas diri laŭde pri la laborego de nia amikaro kaj precipe de la ĉefperantoj. Ĝi indikas ankaŭ ĉion kion ni rajtas esperi pri la estonto de nia organizo.

Serĉante novajn rilatojn kaj anstataŭantojn por vakaj funkcioj, la estraro daŭre klopodis trovi junajn personojn por la diversaj taskoj; fakto, kiu por junular-organizo estas natura, por **esperanto-junularorganizo** tamen ne ĉiam facila afero. La praktiko tamen pruvis, ke la evoluo iras bondirekte.

La pasinta jaro estis vigla jaro; ne nur el vidpunkto de organiza rekonstruo, sed ankaŭ laŭ spirita renovigo. Ambaŭ faktoj estu por ni garantioj pri bonrezultoj ne nur por TJO, sed por la tuta movado!

**Estraro.** Dum la jaro forlasis la estraron: Jekke van Dijk, S-ino E. v. Veenendaal—Bouwes, Job Kars. Ĝi ekzistas nun el: P. Krijt (prez.), Floor Meydam (sekr.), Rinus van der Horst (kasisto), H. J. Schut, W. Bant.

Ĝi kunvenis: 12 Aŭgusto, 5 Decembro, 10 Marto, 26 Majo, 23 Junio.

**Ĉefperantoj.** Novaj ĉp. venis en: Aŭstrujo, Anglujo, Belgujo, Ĉeĥoslovakujo, Hispanujo, Italujo, Nederlando, Portugalujo, Skotlando, Svedujo, Svisujo.

## TJO-Centro

estis fondata la 12an de aŭg. '45. Ĝi havas sidejon en West-Graftdijk, Ned., kaj estas gvidata de F-ino Nelly Kool. Ĝi prizorgas: administracion de membroj kaj abonantoj, vendadon de eldonaĵoj (**libroservo, propagandservo**). La libroservo estas nova fondaĵo; ĝi ekestis per la transpreno de la privata eldonejo de Ges-oj v. Veenendaal.

La **Ĝenerala Propagandservo** ne memstare laboris; ĝi funkciis kiel partoj de la sekretarioj kaj TJO-Centro. Pro la nuntempaj cirkonstancoj ĝi ne povis fari novajn eldonojn, krom la eldono de glumarkoj.

La **Juna Vivo** fariĝis ek de la reapero la oficiala eldono de TJO (antaŭe ĝi estis eldono de Ges-roj van Veenendaal). Post la abdiko de S-ino v. V. La Juna Vivo estis redaktata de F-ino N. Kool, ĝis oficiala elekto eblos. Laŭ deziro de la pli multo de la legantaro ni konservis la kutiman karakteron de la gazeto, klopodante doni legaĵojn ne nur por junaj, sed ankaŭ por novaj esperantistoj.

### Kunvenoj.

Pro cirkonstancoj ne eblis aranĝi internacian junularkunvenon. Pro la iniciato de la belga sekcio tamen okazos en Aŭg. '46 internacia konferenco, aranĝata de TJO/Belgujo.

### Korespondservoj.

Laŭ la ekzemplo de la angla sekcio ni instigis al fondado de korespond-centroj en diversaj landoj; kvankam tiuj servoj devis forigi la ĝenon pro la ne-apero de LJV aŭ de korespondrubrikoj en ĝi, ili tamen ankaŭ nun ankoraŭ montras sin utilaj.

### Rilato kun aliaj asocioj.

(Vidu la landajn raportojn). Kun IEL ni renovigis la rilatojn, kaj pristudis informojn pri eventuala aliĝo de TJO, kiel kunlaboranta faka organizo, al IEL. La estraro disponigos la informojn por pristudo al la Junular-Konferenco 1946a en Belgujo kaj esploros la opinion de la membraro poste per referendumo.

Ni akceptis kunlabori kun IEL en la kolektado de petskriboj, oferotaj al la Unuigitaj Nacioj. La estraro petis al la landaj sekcioj, fari tiun laboron, se eble lojale en la kadro de landaj asocioj, kiuj okupas sin komune pri tio.

Al la „Tutmonda Junular-Konferenco” en Londono (Okt. '45) ni telegrame oferis asiston kaj petis al S-ro Heath, Ipswich, Anglujo, esplori la eblon de realigo.

Leerdam, 1-7-'46.

F. M.

Membro-Stato je 30/6/'46.

		abonantoj:
Nederlando .....	497	142
Anglujo .....	161	15
	grupe 94	
Belgujo .....	52	1
Bulgarujo .....	2	
Ĉeĥoslovakujo .....	4	1
Danujo .....	1	2
Finnlando .....	2	19
Francujo .....	55	Argentino ..... 1
Hispanujo .....	3	Brazilo ..... 1
Italujo .....	1	Norvegujo ..... 5
Jugoslavujo .....	1	Islando ..... 2
Maroko .....	1	Interŝange ..... 60
Portugalujo .....	18	
Svedujo .....	30	25
Usono .....	1	Francujo ..... 35
Svisujo .....	6	Hispanujo ..... 1
Aŭstrujo .....	2	
	931	310

Financa Raporto de TJO de 1.7.'45 ĝis 30.6.'46.

Enspezoj.		Elspezoj.	
Kotizoj kaj abonoj	f 1803,41	La Juna Vivo ....	f 954,33
Donacoj .....	„ 454,80	TJO-Centro .....	„ 680,49
TJO-eldonaĵoj		Kostoj estraro ...	„ 211,91
antaŭmilitaj ...	„ 40,17	20 % de la ned.	
Pruntita .....	„ 30,—	kotizoj al Ned.	
		Lab. Komitato .	„ 205,—
Saldo 1941 .....	„ 33,—	Saldo 30.6.'46 ....	„ 309,65
	f 2361,38		f 2361,38

El la 17 landoj kie TJO havas membrojn ni nur povas disponi pri la mono el Anglujo, Belgujo, Francujo kaj Nederlando. Por Svedujo ni trovos solvon, de el Portugalujo ni aĉetis librojn sed en la ceteraj landoj oni tenas la monon ĉe la ĉefperantoj. Ĉar en ĉiuj landoj oni tuj deprenis 20 % por la enlanda laboro ni nur en Nederlando devis pagi tion al la Ned. Labor Komitato ĉar tie la TJO-Centro enkasigas la kotizojn.

Povos esti necese prunti pli da mono pro la fakto ke la frostita sumo ne povas ankoraŭ veni al Nederlando. Kiam tio necesos ni kalkulos je ĉies helpo.

Dankon al la donacintoj en Anglujo kaj Ned. kiuj per tio faris grandegan servon al TJO.

Ĉar ni volas eldonadi LJV daŭre en la sama formo kaj formato necesas ke la nombro da abonantoj fariĝos pli granda. Nur per eldonkvanto de 2000 ekz. ni povos daŭrigi la kontrakton kun la presisto. La presiston ni ĉi tie aparte dankas ĉar li ankaŭ tiam, kiam ni ne jam havis havis registaran paperpermeson kaj nek ricevis paperon, tamen presis LJV.

Pretigante la raporton mi ankoraŭ ne ricevis ĉiujn raportojn de niaj ĉefperantoj, pro kio mi ne povas doni ciferojn pri ricevota mono.

Ni ne jam repagas la prunton de f 30,— sed ni promesas fari tion kiom eble plej baldaŭ ĉar prefere ni laboras senŝuldoj.

Ni nur ankoraŭ havas ŝuldon al la presisto pro la numeroj de majo kaj junio.

Bilancon kaj budĝeton ni pro la konataj cirkonstancoj ne ankoraŭ povas kunmeti.

Je 1.8.'46 la TJO-Centro komencos je konto de TJO la vendadon kaj kiam eble la eldonadon de Esperantaĵoj. De tiu fako ni atendas multan bonon por nia organizo kiam ĉiuj amikoj atentas pri ĝi.

M. v. d. Horst.

### LISTO DE ĈEFPERANTOJ.

**Aŭstrujo:** Johann Leopold Germela, Thongasse 3/3/12, Wien III/40.

**Belgujo:** C. Braet, Esscheboomstr. 1, Brugge.

**Britujo:** F-ino Rees, „Derwydd”, Seven Sisters, Neath, Glam. Wales.

**Ĉeĥoslovakujo:** Jaromir Jermár, Zabéhlice Jablonová 23, Praha.

**Finnlando:** Svante Kivinen, Vipurinlääni, Kouvola.

**Francujo:** S-ino Turin-Montagnon, Instruistino, Trepot, Doubs.

**Hispanujo:** Octavio de Diego la Rosa, Baltasar Gracián 23—3°, Zaragoza.

**Italujo:** Prof. Camuffo Armando, v. Bartolomeo d'Alviano 4 IV, Trieste.

**Nederlando:** Henk Uittenbogaard, Koekkoekstr. 22, Hilversum.

**Portugalujo:** A. P. da Silva, Quinta do Ferro, Rua B. No. 28—20, Dto. Lisbono.

**Skotlando:** S-ro A. Gordon, 28 Holehouse Rd., Kilmarnock.

**Svedujo:** K. E. Karlsson, Upplandsgatan 691, Stockholm.

**Svisujo:** Eugen Klee, Brasselmühle, Rheineck.

### **Raporto pri la Belga Sekcio de T.J.O.**

(de majo 1945 ĝis la 30a de junio 1946).

Ne ekzistis belga sekcio de TJO en majo 1945a. Ni devis atendi ĝis septembro 1945a por vidi unuan signon de vivo.

Efektive, mi, post mia soldatservo (mi ekssoldatiĝis en aŭgusto 1945a), tuj serĉis kontakton kun estrarmembro de TJO en Nederlando, S-ino Van Veenendaal. Mi estis aktiva membro antaŭ la milito, kaj kvankam mi nun estas plenaĝa, mi tamen volis daŭrigi la junularlaboron kiel peranto aŭ gvidanto de junulargrupo. Tamen, ĉar la antaŭmilita ĉefperantino pro diversaj familiaj cirkonstancoj abdikis, S-ino Van Veenendaal petis al mi plenumi tiun taskon. Mi akceptis.

Kaj la laboro komenciĝis. Mia unua ago estis serĉi kontakton kun diversaj belgaj junularorganizoj, politikaj, religiaj kaj neŭtraj. La unuaj semajnoj de mia peranteco mi skribadis leterojn al diversaj personoj, kiuj, mi opiniis, povus sin interesi al TJO. Ankaŭ al esperantistoj. Ĉie kie mi aŭdis ke povus ekzisti junulargrupo esperantista, mi sendis novaĵojn por konatigi kaj propagandi TJO. Finfine sukceso venis. Sekve de nura letero sendita de mi, la junulargrupo „Juneco” el Braine-le-Chateau aliĝis al TJO. Jen la unuaj gemembroj. Nun mi ne plu staras sola; aliaj gekamaradoj helpas.

En oktobro mi komencis la eldonon de TJO-bulteno, kiun ĉiuj gemembroj en la estonto ricevos senpage. La unuan numeron mi sendis al ĉiuj antaŭmilitaj TJO-membroj. Kelkaj realiĝis kiel subtenantaj membroj.

La 23/11/45 la radistacio Kortrijk elsendis longan paroladon pri TJO kaj nia sekcio.

Por ordigi la laboron ni starigis laborkomitaton: ĉefperanto, propagandcentro, korespondcentro. La estonto montros ke ni tiel tre efike povos labori.

Mi ankaŭ konigis TJO al la Ministrejo de l'Publika Instruado, oficejo: Nacia Servo por la Junularo. La letero kiun mi ricevis de tiu instanco enhavis tre simpatiajn vortojn por nia juna movado.

Ankaŭ la estonto montros ke ni pravis konatigi TJO al tiu servo.

Mi aperigis artikolojn pri Esperanto kaj TJO en nacilingvaj gazetoj, nome en „Het Kustblad”, „Auberges” kaj „De Sea-Scout”. Sekve de tio kelkaj junuloj interesas sin pri TJO kaj komencis kurson. La propagandcentro zorgis pri la lernolibroj.

Dua TJO-bulteno aperis en decembro. La gemembraro iomete kreskis. Mi komencis porkomencantan kurson en la porinstruista lernejo en Blankenberge kaj en Brugge.

Por fari personan konatiĝon kun ĉiuj geperantoj kiuj jam laboris je tiu momento kaj preparoli kelkajn aferojn, mi aranĝis labor-kunvenon en Brugge. Ĝi okazis la 29/12/45. Raporto pri ĝi aperis en la 3a TJO-bulteno kaj novaĵoj pri ĝi en La Juna Vivo.

Nia sekcio akceptis organizi la 3an internacian junularkunvenon, sed, post estrarkunveno de TJO, ni reprenis la decidon. Sed ni tiam decidis organizi nacian junularkunvenon en Blankenberge al kiu ni invitos ĉiujn eksterlandajn TJO-anojn.

La 4a & 5a TJO-bultenoj (februaro-marto 1946) aperis. Ni faris alvokon al la gemembroj kunlabori por la petskribo de I.E.L. al U.N.O.

La 6a bulteno (aprilo) aperis trilingva. Tiel ni esperas uzi la bultenon ankaŭ kiel propagandilon ĉe la neesperantistoj.

Dum la paskaj tagoj, la du membroj Philippe Cullus kaj Raymond Philippon vojaĝis al Nederlando, kie ili ĉeestis tre interesan TJO-kunvenon en Hilversum.

La 7a bulteno (majo) parolis pri la Blankenberga kunveno. Aliĝilo por tiu kunveno estis aldonita.

La 30an de junio nia sekcio posedas 43 aktivajn gemembrojn.

La propagandcentro, de decembro 1945a ĝis nun, tre necesis: por vendi lernolibrojn, vortarojn kaj ĉiujn aliajn propagandaĵojn al la diversaj gemembroj kaj interesuloj. Dankon al Grégoire Maertens kiu prizorgas tiun oficon.

La korespondcentro estis necesa: la novaj gemembroj ŝatante korespondadi kun fremdaj TJO-anoj, uzis sukcesplene la korespondcentron por trovi la taŭgan korespondant(in)on. Dankon al Philippe Cullus, la respondeculo.

Pere de la „Nacia Servo por la Junularo” ni ricevis la rajton uzi la junulargastejon kaj festsalonon de la porinstruista lernejo en Blankenberge, por organizi nian junularkunvenon.

Nun jam 10 gejunuloj, novaj gemembroj, aliĝis por la nova administra jaro. Mi antaŭvidas por la nova jaro kreskon de la membraro ĝis cent kaj eĉ pli.

Nia sekcio havas tre fortan deziron: vidi la TJO-filmojn, kaj per ili propagandi en la tuta lando en ĉiuj junularmedioj.

Dum la laborkunsido en decembro 1945a ni faris div. proponojn al la TJO-estraro. (Vidu proponojn).

Bruĝo, la 30an de junio 1946a.

Carlos Braet, Belga ĉefperanto.

### **TJO en Britujo.**

Dum la milito S-ro Holland organizis TJO-n sur enlanda bazo. Aliĝis unuj post la aliaj pli ol 600 anoj, je tre malalta kotizo; la Brita TJO prizorgis bonajn servojn kaj zorge vartis la ideon de Esperanto dum la malfacilaj jaroj. Sed la plimulto el la anoj ne konis la Internacian Movadon, kaj kiam TJO ree internacie funkciis la respondo al la alvoko estis iom malrapida. Tamen je la fino de la jaro ni registris 216 anojn — plenaĝulojn kaj ĝeneralantojn.

Dum la kuranta jaro S-ro Heath prizorgis la korespondcentron.

Nelly Rees.

Dum la jaro 1945—46 la Korespondcentro kontentige funkciis. Nia plej granda malfacilaĵo estis la malkuniĝo de la du partoj de nia dum-milita organizo: la lernej-infanoj kaj la junularo.

Ni povis aranĝi korespondadon inter Angloj kaj multaj alilanduloj, plejparte Francoj. Oni esperas, ke dum la venonta jaro eblos pli bone organizi la interrilatiĝon nun ekzistantan inter la jam starigitaj landaj korespond-centroj.

### **Raporto de nia Ĉeĥoslovaka ĉefperanto.**

La TJO havis neniam en Ĉeĥoslovakujo tiel fortan kaj tradician pozicion kiel ekzemple en Nederlando kaj Belgujo. Tial ankaŭ post tiu ĉi milito oni ne devis „restarigi” la TJ-Organizon, sed pli bone fondi ĝin en Ĉeĥoslovakujo. Estas do evidente, ke la preparaj laboroj bezonas multe da tempo kaj la rezultoj ne venas tiel rapide. Mi presigis anoncon pri TJO en Organo de ĉs. esperantistoj „Esperantista”, kiu aperos en tiu ĉi monato; mi multobligis ĉeĥan varbilon kaj alsendas ĝin al ĉiuj esp.-societoj kaj kursoj.

Oni do vidas, ke mi fakte ne komencis ankoraŭ rektan propagandon, sed nur faris ĉiujn necesajn preparojn por ĝi. Kaj, ĉar mi efektive komencos je 1<sup>o</sup> fino de tiu ĉi monato, mi esperas „rikolti” finaŭguste la fruktojn.



Mi preparis ankaŭ artikolon pri TJO en „Mladá fronta” (La juna fronto), ĵurnalo de ĉeĥa junularo, kaj, kontraŭe, prelegon pri organizo de ĉs. junularo en esperanta disaŭdigo de ĉs-radio.

### **T.J.O. Finnlando.**

Lastsomere okazis semajna Esperantista tendaro en Punkaharju kun 100 partoprenantoj, kelkaj el Svedujo kaj Danujo. — De la 30-a de tiu ĉi monato okazos simila tendaro en Taipalsaari. La kurso fariĝos 10-taga kaj estos organizata de Esperanto-Instituto de Finnlando. Ankaŭ al ĉi tiu kurso oni atendas kelkajn partoprenantojn el Danujo kaj Svedujo.

Dum la lasta jaro oni instruis Esperanton (kiel libervolan fakon) almenaŭ en kelkaj popolaj lernejoj de la sekvantaj urboj: Helsinki, Tampere, Oulu, Vaasa, Turku kaj en urbetoj Kouvola kaj Somero (en la l.n. en la gimnazio).

Pere de la ĉefperanto de TJO. 20 personoj abonis la JV'n sed bedaŭrinde nur nun aliĝis al TJO. — Kredeble oni instruis la lingvon ankaŭ en kelkaj provincaj lernejoj, kvankam la instruistoj estas tro modestaj por informi pri la afero.

Sajnas ke la intereso pri la lingvo nun post la milito pli grandiĝis ankaŭ en Finnlando kaj estas ankaŭ kredeble, ke venontaŭtune, kiam ree komenciĝos la lerneja laboro post la ferio, la nombro de la abonantoj pligrandiĝos.

Svante Kivinen.

### **Raporto de la ĉefperantino en Francujo pri la franca sekcio de TJO de majo 1945 ĝis la 30a de junio 1946.**

1945. Antaŭ ol mi ricevis novaĵojn el Nederlando, mi dissendis cirkuleron pri TJO franclingve skribitan; mi fiksitis provizoran kotizon de 20 fr.fr. Dum majo kaj junio mi varbis 36 anojn. Je tiu momento, mi recevis novaĵojn el Nederlando: la kotizo estis fiksita je 50 fr.fr.

Mi klopodis akceptigi kiel „specialan sekcion” la francan sekcion de TJO en UEF (Unuiĝo de Esperantistoj en Francujo). Oni akceptis la aliĝon. TJO estis menciita en la gazeto: „Franca Esperantisto”.

Sekve, je la fino de la jaro 1945a, la nombro de la francaj anoj estis 80. Sed, inter tiuj anoj, multaj pagis nur la provizoran kotizon de 20 fr.fr.

**1946.** Komence de la 1946a, pro la devalvado de la franca mono, oni devis altigi la kotizon ĝis 100 fr.fr. kaj la abonon al LJV ĝis 60 fr.fr. Sekve multaj ekzigis, aliaj nur abonis LJV-n. Bona helpanto estas S-ano Dominiko Perez, kiu zorgas la korespond-servon kaj varbis multe por TJO en sia regiono.

Mi propagandis precipe inter la gejunuloj de la junular-gastejoj. Mi sukcesis aperigi artikoleon pri TJO en la marta numero de ilia gazeto. Tiu artikolo havigis al mi multajn petleterojn pri Esperanto aŭ pri TJO.

Mi petis la esperantan gazeton el Lyon „Kompreni” bonvoli aperigi informojn pri TJO, sed mi ne sukcesis.

Ankaŭ al la redaktoro de Esperanto-Lernejo (la gazeto de la esperantistaj edukistoj) mi skribis por presigi artikoleon pri TJO en E.L., sed ankoraŭ sensukcese.

Nur Franca Esperantisto presigis informojn pri TJO kaj en la lasta numero pri Blankenberge.

Por la nacia Kongreso en Lyon je la 9a de junio mi sendis raporton pri TJO, ne povante ĉeesti persone la kongreson.

Antaŭ kelkaj monatoj, post rimarkoj de S-ro van der Horst, mi proponis altigi la abonprezon al LJV por Francujo ĝis 70 fr.fr., sed lasi la kotizon de TJO 100 fr.fr.

La 30an de junio la nombro de la anoj fariĝis 29 kaj de la abonantoj 36. La 65 adresojn mi sendis al F-ino N. Kool, ĉar mi posedas la monon.

Estas ankoraŭ proksimume **20 kaj pli** da personoj kiuj aliĝis al TJO per la franca asocio UEF, t.e. resendis 20 fr.fr. al TJO. Sed, malgraŭ informoj presigitaj en Franca Esperantisto, por peti kompletigon de la kotizo, mi ricevis nenion. Do mi ne sendis tiujn adresojn al la TJO-Centro.

Pri la kunveno en Blankenberge bone propagandis S-ano Lentaigne en sia regiono. Skribis por peti klarigojn kelkaj el suda Francujo kaj ankaŭ el norda Francujo. Sed ne venis certaj aliĝoj ĝis nun.

### Rimarkoj de la ĉefperantino.

La anoj de TJO en Francujo estas izolitaj: mankas sekcioj de TJO kun viglaj varbantoj. Mi ne povas fari multe en mia malgranda vilaĝeto; cetere mia familia tasko postulas grandan tempon. Mi skribas, propagandas kiel mi povas; sed ne estas sufiĉe agi koresponde. Ni bezonas viglajn personojn, ne edziĝintajn,

kiuj povus libere vojaĝi kaj propagandi. Ni bezonas perantojn en la grandaj urboj, — okaze de la kunveno en Blankenberge ni devos elekti plej taŭgajn perantojn por Francujo. Ankaŭ mi bezonas bul-tenon kiu estu ligilo inter la francaj anoj. Jam nun nepre ni devas pli bone organizi nin por la 1947a .

M. Turin—Montagnon.

### **Raporto pri la Agado de la Hispana Sekcio de T.J.O.**

Je la 11-a de Januaro 1946a mi ricevis komunikon el la centra oficejo de T.J.O. en Nederlando kie oni proponis al mi fariĝi ĉi tiea ĉefperanto kaj komisiis al mi la starigon de la Hispana T.J.O.-sekcio.

En Hispanujo pro la nunaj cirkonstancoj estis tute neeble disvolvi la nepran aktivecon por la kresko de tiu ĉi asocio, ĉar malbone konsideras nia estraro la Esperantmovadon: pro ŝtata malpermeso oni disigis ĉiujn Esperantajn asociojn, malpermesante ankaŭ la eldonadon de revuoj, ĵurnaloj ktp. Ankoraŭ hodiaŭ oni ne permesas al ni krei Esp-asociojn kaj tial estas treege malfacile interriliati kun aliaj samideanoj kiuj ankaŭ povus helpi nin. Plie, post tiom da jaroj (1936 ĝis nun) dum kiuj oni apenaŭ permesis uzi Esperanton kaj dum kiuj oni tute malpermesis la propagadon, nun ni ne trovas junularon pretan por helpi en nia tasko.

Tamen mi povis krei malgrandan rondeton kiu klopodas, per ĉiuj rimedoj materialaj, moralaj kaj laŭleĝe eblaj, la disvastigon de T.J.O. en Hispanujo.

Baldaŭ (1-an de Julio?) ni intencas komenci „neoficialan” Esperantokurson celante formi la unuajn samideanojn kiuj helpos nin kiam ni libere povos esprimi niajn sentojn.

Nuntempe ŝajnas ke la registaro iomete mildigas sian sintenon kontraŭ Esperantaj aferoj kaj mi esperas ke baldaŭ ni povos agi sen ŝtata interveno.

Octavio de Diego de la Rosa.

### **Raporto de la Nederlanda Labor-Komitato.**

Dum la unua postmilita membrokunveno de TJO, je la 12a de aŭg. '45 en Koedijk, kie ĉeestis 6 estraranoj, ni decidis elekti Ned. Labor-Komitaton, kiu prizorgu la ned. aferojn de TJO. La membroj estas: Henk Uittenbogaard (ĉefperanto), Guus Bankersen

(kasistino), Maartje Seilberger (ĝeneralaj aferoj) kaj Maarten Leegwater (redaktoro de la „Bulteno”).

### **Kunvenoj.**

Dum Pasko la N.L.K. organizis dutagan kunvenon en Hilversum, kiu bone sukcesis. Cetere ni aranĝis elsendon de Ned. Esperantistoj al Danujo per aŭtobusoj kaj de Danoj al Nederlando. Bedaŭrinde je la lasta momento la malfacilaĵoj, kiujn la Danoj spertis montriĝis tiel grandaj, ke la vojaĝo ne povis okazi.

Dum la semajno de 7—14 aŭg. '46 la NLK organizas somerkunveĥon por la TJO-anoj malpli ol 30-jaraj, kiuj ne povas viziti la kunvenon en Blankenberge. La kampado okazos en la tendejo de la ANJV (Ĝen. Ned. Junular-Org.) en Soesterberg.

#### **La kontakto kun ned. kaj aliaj int. organizoj.**

Ni interkontaktis kun la NJG (Ned. Junular Komuno). La NJG estas la kupolo al kiu apartenas preskaŭ ĉiuj ned. Junularorganizoj. Laŭ iniciato de la NJG oni fondis „Kontaktkomitaton”, kiu do estas la kontaktilo inter la NJG kaj la div. internaciaj junularorganizoj, kiuj havas membrojn en Holando. Je la 16.4 kaj 11.6.46 okazis kunvenoj de la Kontaktkomitato kie ĉeestis reprezentantoj de la NJG, de la World Friendship Association, de la International Friendship League, Friends Society, Ver. voor Int. Jeugd Verkeer (Org. por Int. Junular Kontakto) kaj de TJO. Escepte TJO la int. junularorganizoj nur uzas la anglan lingvon por la int. korespondado; pro tio ili neniam povas atingi la junulojn, kiuj ne parolas tiun lingvon. La graveco de Esperanto montriĝis denove pli bone dum la diskutado pri la eldono de int. organo, kiu devus aperi en tri lingvoj, do estus ege multekosta. Tie ĉi kuŝas belega propagand-tereno por TJO. Komune ni klopodos prizorgi radioelsendon. Cetere ĉiu organizo rajtas presigi unukolonan artikolon en la organo de la NJG: Vrije Vaart. En la sekvonta numero jam aperos artikoleto pri TJO. La Kontaktkomitato decidis kunveni ĉiu-monate.

Kun la aliaj Esp. organizoj nia kunlaboro bone montriĝis en la agado por la IEL-petskribo al la UNO. Escepte de la Fed. de Lab. Esp. ĉiuj Ned. Esp. org. decidis kunlabori. Intertempe niaj membroj jam ricevis la „deklarojn”, kaj en div. lokaj gazetoj aperis alvoko kun la adreso de la TJO-Centro por informoj.

---

**Ne forgesu la Esperanto-Petskribon!**

## La NLK-eldonaĵoj.

La NLK eldonas stencilitan organon, la „Bultenon” en kiu aperas la sciigoj por la ned. TJO-anoj, la anoncoj pri niaj kunvenoj, novaĵoj kaj raportoj el la div. lokaj TJO-grupoj, ktp.

La restarigo de „De Esperantist” ankoraŭ ne efektiviĝis pro manko de papero kaj div. aliaj malfacilaĵoj.

Ni dissendis 250 demandlistojn al la ned. TJO-anoj; ĝis nun la rezulto estas, ke kelkaj pretas fariĝi perantoj, aliaj pretas doni aŭ pruntedoni Esp.-librojn ktp. kiel propagandilojn kaj kelkaj intencas starigi infankursojn.

## La financa Raporto

de la NLK de la 1.9.45 ĝis 30.6.'46.

Enspezoj:	Elspezoj:
156 simpatiantoj ... f 222,50	Poŝtmarkoj ..... f 10,95
401 TJO-anoj po	salonluo ..... „ 9,96
50 cendoj ..... „ 200,50	papero ..... „ 4,90
antaŭpago de	TJO-Bulteno ..... „ 19,55
„De Esperantist” „ 2,—	Diversaj eldonoj ... „ 4,80
poŝtmarkoj ..... „ 3,31	riparo ciklostilo ... „ 6,40
restaĵo kunvenoj ... „ 25,85	antaŭpagoj al
	H. Uittenbogaard
	kaj Mary Krijt ... „ 60,—
	en kaso ..... „ 337,60
	<hr/>
<hr/>	f 454,16
<hr/>	<hr/>

4.7.46.

M. K.

## Portugalujo.

El letero de nia portugala ĉesperanto montriĝis ke la malfacilaĵoj, kiujn li spertis en la disvastigado de Esperanto kaj konsekvence de TJO estas eksterordinare grandaj. Nenia junula organizo estas permesata ekster la kadro de la Portugala Junularo kaj ĝiaj gvidantoj kiuj estas militistoj kaj politikistoj, ne ŝatas Esperanton kaj malhelpas la propagandon por nia lingvo. Ni nur povas esperi ke ankaŭ en Portugalujo la eblo de la libera organiza vivo baldaŭ revenos.

**Raporto pri la agado de la Sveda Sekcio de T.J.O.  
dum la tempo 1/5/1945—30/6/1946.**

La sveda sekcio de T.J.O. komenciĝis la 1/5/1945, laboris per helpo de la disponeblaj rimedoj kiel ni havis. Pro la internaciaj cirkonstancoj, kiuj regis dum longa tempo, kaj ankoraŭ ne ekhavis favoran karakteron por esperanta laboro, la sveda sekcio ne evoluis tiel rapide kiel alie estus la okazo. Sed ni ne plendu pri la jam atingita rezulto, se ni pensas pri la favora atmosfero en kiun Esperanto nun enĝlitis en Svedujo. Dum la ĵus pasintaj jaroj ni ne povis varbi multajn novajn esperantistojn. La kialo ŝajnas esti, ke la publika opinio estis tia, ke oni ne povus ekhavi tujajn avantaĝojn de Esperanto. Tial ankaŭ nia ekonomia stato suferis pro tio. Tial la esperanto movado de Svedujo ne povis fari necesan reklamon.

La sveda sekcio de T.J.O., kiu fondiĝis dum sufiĉe malfavoraj cirkonstancoj, komence kreskis pli kvalite ol kvante.

Malgraŭ tio ni rigardas la venontan tempon kun grandaj kaj lumaj esperoj. Ni gajnis atenton ĉe Sveda Esperanto Federacio kaj ĉe diversaj aliaj svedaj institucioj. Se ni nun profetus, sen tro multe diri, ni atendas, ke en la proksimaj venontaj jaroj „pli bonaj ventoj blovos” kaj ke nia sekcio havos brilan estonton, kaj certe ni ne profetas vane.

La provizora „labor-komitato” de la sveda T.J.O.-sekcio havis 3 protokolitajn kunvenojn dum la tempo, kiun ampleksas tiu raporto.

Ni eldonis 2 bultenojn.

Ni faris peton al la „Sveda Radio-servo” pri „diskutado inter junuloj pri la internacia helplingvo de la estonteco” kiel radio-disaŭdigo kaj tiun ĉi peton ili favore traktis kaj promesis fari baldaŭan aranĝon.

Propagand-artikolojn ni aperigis en diversaj esperanto-gazetoj.

Ek de la komenco de majo ni ekhavis bonegan kunlaboron kun la redaktoro de la faka gazeto „Cykelbilisten”, S-ro Eriksson, por la evoluigo de nia lingvo. Pro diversaj malfacilaĵoj ni ne povis aranĝi planitan junularkunvenon en Stockholmo.

Membro-nombro de T.J.O. sveda sekcio: 35, „La Juna Vivo” aperas je pr. 60 ekz. en Svedujo.

Por la „labora komitato”

Hugo Andersson.

Karl Erik Karlsson.

## **PROponoj**

por pristudo en Blankenberge, kaj decido per posta referendumo.

### **Estraro.**

La estraro konsistu el 7 personoj: Prez., sekr., vic-sekr., kasisto, redaktor(in)o, 2 asesoroj.

La prez., la kas., la 2a sekr. kaj 1 asesoro rezignu pri siaj postejoj je la parnombraj jaroj. La sekr., la red. kaj la alia asesoro forlasu siajn funkciojn je la neparnombraj jaroj. La funkciuloj estu tuj reelekteblaj.

Ni proponas elekti Mary Krijt el Amsterdam kiel vic-sekretario. (Klarigo: per laboro por la ned. sekcio kaj per asisto al la estraro ŝi montris sin taŭga persono por tiu funkcio.

Por la redaktoreco de LJV ni proponas finon Nelly Kool el West-Graafdiijk. (F-ino. Kool ek de la fondiĝo de LJV estis asistantino de la redaktoro kaj lastjare praktike tute redaktis la gazeton. La kombino de la funkcioj por TJO-Centro kaj LJV estas tre favoraj).

Eventualajn aliajn kandidatojn oni proponu al la sekretario.

### **Konsilantaro.**

TJO havu internacian konsilantaron. Ĝi konsistu el la ĉefperantoj. En okazoj, kiam la estraro devas fari gravajn decidojn, kiuj ne permesas prokraston ĝis membrokunveno aŭ referendumo, la konsilantaro konigas sian opinion al la estraro. La konsilantaro ne estas decidorajta, ĉar ĉiu konsilanto reprezentas diferencon membron.

### **Regularo.**

Ĉi-supraj proponoj post akceptiĝo estu aldonataj al la statuto. Dezirinde estas, aldoni ankoraŭ kelkajn pli-malpli gravajn regulojn pri internaj aferoj. Detaloj sekvos je la

### **Referendumo.**

Post la kunveno en Blankenberge ni presigu en LJV aŭ en cirkulero artikolojn de personoj kun diferenca opinio pri eventualaj problemoj pritraktataj en Blankenberge. Post tio ni okazigu referendumon, per kiu ni decidus.

## **Proponoj de la Belga Sekcio.**

1. aliĝoj de TJO al IEL, la ĝenerala movado, kaj forta kunlaboro kun ĉiuj aliaj fakorganizoj (SAT, IKUE, ktp).
2. aĝolimo por la aktiva membraro en TJO. (Tamen ne gravas

se plenaĝuloj estas elektataj de la gejunuloj kiel peranton aŭ gvidanton aŭ funkciulon).

3. specialaj kotizoj por membroj de TJO-grupo.

### Propono de S-ro. Heath. (Britujo).

Jen sugesto por pripensado en la Blankenbergia Konferenco: Ke TJO aliĝu al la Monda Federacio de Demokrataj Gejunuloj kaj ke nun el niaj plej agemaj kaj spertaj francoj reprezentu TJO-n ĉe la Parizaj Kunvenoj. (La nuna ĉefsidejo estas ĉe Palais Royal, 2 rue de Montpensier, Paris, 1er Prezidanto: S-ro. Guy de Bois-son).

### Propono de la Nederlanda sekcio.


Kompletigi la regularon rilate al la foriro kaj elekto de la landaj ĉefperantoj.

### Propono de la Sveda Sekcio.

Tutmonda Junular Organizo aliĝu al IEL, kiel faka- aŭ kunlaboranta organizo. Nia opinio estas, ke dum la nunaj cirkonstancoj, ni laboras tro malpraktike, ni anstataŭe laboru unuigitaj, por ke ni per komunaj fortoj, kio signifas pli grandan efikecon, laboru por Esperanto.

Ni devas eviti disiĝon; ni devas esti unuigitaj!

*Noto de la red.:* Ĉar la raporto pri la filmservo envenis tro malfrue, ĝi aperos en la septembra No. — Lastmomente ni sciigis, ke la ŝuldo al la presisto sumiĝas 269,31 guld.



Jen la nova glumarko! Ĉiu TJO-ano propagandu per ĝi, kaj atentigu tiel pri nia junularmovado!

**Prezo: (afrankite) 100 ekz: f 0,75**  
(aŭ egalvaloro)  
50 ekz.: f 0,40 (aŭ egalvaloro)

Geamikoj, vi multe helpas nin, se vi pagas vian kotizon kiom eble plej baldaŭ. Tion farante, vi ŝparas al vi mem la kvitanckostojn!